

Rolf Krenzer,
Kant' por la suno

tradukita de Manfred Retzlaff

1. Jen kant' por la suno,
la frat' radiantanta,
donanta la lumon al mi.
Pro tio mi laŭdas
Vin, mia Sinjoro,
laŭ mia talento kaj sci'.

2. Jen kant' por la steloj
dumnokte brilantaj
kaj kant' por la lun', la fratin'.
Beligis vi ege,
ho Di', la ĉielon!
Sinjoro, laŭdegas mi vin.

3. Prikantas mi ĝoje
la freŝan aeron,
ĝi donas la spiron al mi.
Kaj kantas mi same
pri l' vento blovanta.
Pro tiuj mi dankas vin, Di'!

4. Jen kant' por la akvo,
forigas soifon
ja tiu afabla fratin'.
Kaj kant' por la fajro,
la frat' varmiganta.
Sinjoro, dankegas mi vin.

5. Jen kant' por la tero,
la bona patrino,
konservas kaj nutras ŝi nin.
Mi dankas, kreinto,
por floroj kaj fruktoj.
pro tio laŭsdegas mi vin.

6. Jen kant' por la vivo,
la frato, la patro,
en kiun vi metis min, Di'.
Dumtage mi pensas,
dumnokte mi songas,
sentante la vivon en mi.

...

7. Kaj kant' por la morto,
 la frat' atendonta
 min jam je mia viv-fin'.
 Forprenos li timon
 kaj donos li pacon,
 al Dio kondukos li min.

8. Laŭdegas kaj gloras,
 servadas kaj dankas
 mi, kiel scipovas mi ĝin.
 Prikantas humile
 mi mian kreinton,
 nur Lin, ĉiun tagon nur Lin.

*Traduko de la Germana poemo "Ein Lied für die Sonne" de ROLF KRENZER (*1936-08-11 – †2007-03-16) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1989-02-26.*

MR-204-2 / Arg-652-1311 (2012-11-19 14:27:59)

Tiu ĉi poemo estas verkita laŭ la t. n. Sunkanto de Francisko de Asizo. Vidu la retejon: http://eo.wikipedia.org/wiki/Kantiko_de_la_Kreita%C4%B5oj. La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Lele kaj Detlev Jöcker. Pri la komponisto vidu la retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Detlev_J%C3%B6cker.